

ESPERANTO

★ TRIUMFONTA ★

Internacia

SEMAJNA

Neŭtrala

Abonon ĉiu pagas laŭ la taga kurzo de sia propra valuto, se eble per ŝtataj monbiletoj en rekomendita letero, aŭ per ĉeko, sed ne per poŝtmandato. — Abonantoj, kies abono estas finiĝinta, ricevas ĝustatempe **admonilon**. — Abonoj povas esti komencataj per iu ajn numero.

Por Abono oni sendu laŭvole altan sumon, kaj ni liveros tiom da numeroj, por kiom valoras la pago. — **Prezo de unu numero:** 0.06 dolaro, 0.15 guld., 0.24 sved. kr., 0.30 svis. fr., 0.30 dana aŭ norvega kr., 0.30 peseto, 3/2 pencoj, 0.50 fr. aŭ belg. fr., 0.70 liro, 1.20 fmk., 1.40 ĉ. kr., 4 germ. mk. (por balaj kaj balkanaj ŝtatoj), 2 germ. mk. (por rusoj), 10 hung. kr., 50 pol. mk., 70 aŭstr. kr.; internacie 1 respond. kupono.

Por adresŝanĝoj ni kalkulas la prezon de 5 numeroj. — Liston de niaj Abonejoj en diversaj landoj — vidu sur paĝo 41. — Germanio abonu nur ĉe sia poŝtoficejo (kvaronjare 48 mk.); senpera alsendo sub banderolo — kostas kvaronjare 65 mk.

Fariĝu
Dumviva
Abonanto
pagante sesobl-
an jar-abonon!

Vidu nian klarigon
sur paĝo 31!

Numero 90 :-: Antwerpen, Barcelona, Edinburgh, Kaunas, Köln, Paris, Warszawa :-: 25. Junio 1922.

Universala Ligo Esperantista.

Projekto de Statuto de la Universala Ligo Esperantista

verkita laŭ raporto prezentiita al la XIII-a Kongreso de Esperanto en Praha. — Kun proponoj pri ŝanĝo de kelkaj reguloj faritaj de Gabriel Chavet, ano de la komisiono.

I. Celoj.

1. Sub la nomo „Universala Ligo Esperantista“, nomata en ĉi tiu statuto „la Ligo“, ekzistas asocio, kiu celas:

- a) disvastigi la internacian lingvon Esperanto, per ĉiuj rimedoj;
- b) starigi konstantan kazon por la subtenado de la Esperanta¹⁾ Lingva Komitato kaj Akademio;
- c) starigi konstantan kazon en diversaj landoj por faciligi poresperantajn kaj peresperantajn internaciajn interrilatojn kaj servojn, kaj precipe daŭrigi kaj disvolvigigi la laboron ĝis nun faritan de Esperantista Centra Oficejo kaj Universala Esperanta Asocio;

ĉ) organizi bibliotekon kaj klasigi kaj konservi arkivojn kaj statistikojn de Esperanto;

d) eldoni oficialan gazeton, kaj bultenojn, librojn, broŝurojn, kaj aliajn propagandilojn;

e) plifaciligi ĉiuspecajn intelektajn moralajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, sen diferenco pri raso, nacieco, religio aŭ lingvo;

f) kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidareco kaj disvolvigigi ĉe ili la komprenon kaj estimon por fremdaj popoloj;

g) reprezenti la Esperantan movadon ĉe registaroj, kaj publikaj, naciaj kaj internaciaj institucioj;

ĝ) kaj, ĝenerale, fari ĉion kompetentan kaj laŭleĝan, kio iel povas akceli la diritajn celojn aŭ iujn el ili.

II. Neŭtraleco.

2. La Ligo estas neŭtrala rilate al religio, nacieco kaj politiko. En ĝi viroj kaj virinoj estas egalrajtaj kaj elekteblaj al ĉiuj oficoj.

III. Oficiala lingvo.

3. La oficiala lingvo de la Ligo estas la Zamenhofa Lingvo Esperanto, difinita per la Fundamento de Esperanto, sia literaturo kaj sia teknika verkaro, kaj kontrolata en ĝia evoluo de la Esperanta²⁾ Lingva Komitato.

IV. Jura Sidejo.

4. La jura sidejo de la Ligo estas en la urbo elektita de la Ĝenerala Komitato.

V. Organizo.

La Membraro de la Ligo konsistas el:

1. Personoj („Liganoj“) kaj
 2. Societoj loĝaj, naciaj, fakaj ktp.
- La ĝenerala gvidado kaj administrado de la Ligo estas farata de la „Ĝenerala Komitato“.
- La celoj de la Ligo estas efektivigataj pere de Fakaj Komitatoj.
- La Fakaj Komitatoj de la Ligo konsistas el du ĉefaj komitatoj:

1. „Propaganda Komitato“ kaj
2. „Servada Komitato“.

La Ĝenerala Komitato rajtas starigi pluajn komitatojn laŭbezone.

Al la Ligo povas aliĝi „Aprobantoj“, t. e. ne-Esperantistaj organizatoj kaj personoj, kiuj morale kaj finance subtenas Esperanton. Ili ne havas rajton voĉdoni.

VI. Personaj Membroj.

Rajtas esti Ligano „ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto, tuie egale por kiaj celoj tiu ĝin uzas“, kaj kiu havas honorindan karakteron, pagas la kotizon kaj plenumas la postulitajn kondiĉojn. Tamen la Ĝenerala Komitato rajtas rifuzi elekton de persono, kiun ĝi malaprobas, ne donante motivon.

„Dumviva Ligano“ estas membro, kiu pagas unufoje por ĉiam kotizon kaj abonon fiksitajn de la Ĝenerala Komitato.

Rajtoj de Liganoj.

Liganoj rajtas elekti delegiton kaj vicdelegiton; voĉdoni en la kunveno de sia loko; ricevi membro-karton kaj jarlibron; kaj uzi la ĝeneralajn servojn de la Ligo.

Aldone al tio, ili rajtas ricevi la „Oficialan Gazeton“, se ili abonas ĝin.

„Honoraj Membroj“ estas personoj, kiujn, pro gravaj servoj aŭ donacoj faritaj al la Ligo, la Ĝenerala Komitato distingas per tiu titolo. Ili ne pagas kotizon kaj ne rajtas voĉdoni. Ili ricevas la dokumentojn, kiujn decidas sendi la Ĝenerala Komitato.



Lübeck. — Burgtor (Kastela Pordego). Vidu artikolon sur paĝo 21!

VII. Societo-Membroj.

Ĉiu loka, nacia aŭ faka Esperantista Societo, kies regularo akordiĝas kun ĉi tiu statuto, kaj kiu pagas la postulitan kotizon, rajtas aliĝi al la Ligo kiel societo-membro.

Ĝi pagas kotizon fiksitajn de la Ĝenerala Komitato kaj almenaŭ po unu svisa franko por ĉiu deko da ĝiaj membroj, sed la minimuma kotizo de ĉiu societo estas 10 svisaj frankoj.

Ĝi rajtas partopreni en la elekto de reprezentantoj de societoj en la Ĝenerala Komitato kaj ricevi la „Oficialan Gazeton“.

VIII. Lingva Komitato kaj Akademio.

Funkcias apud la Ligo la Lingva Komitato kaj Akademio.

La Lingva Komitato estas rigardata kiel aŭtonomia oficiala institucio kreita de la Esperantistaro.

La Ĝenerala Komitato rajtas nomi al la Akademio kandidatojn por la Lingva Komitato en la okazo de elekto de novaj membroj.

IX. Deleĝitoj.

En ĉiu loko, grava pro sia grando, la Ligo klopodas elektigi „Deleĝiton“ kaj Vic-Deleĝiton.

La Deleĝito reprezentas la Ligon en sia loko kaj reprezentas ĉe la Ligo la lokajn Liganojn.

La Ĝenerala Komitato starigos regularon, kiu difinas la manieron de elekto, la funkciojn, kompetentecojn kaj devojn de la Deleĝito.

X. Ĝenerala Komitato.

La „Ĝenerala Komitato“ (Ĝ. K.) konsistas el:

1. Ses anoj elektitaj de la Liganoj pere de la Deleĝitoj, por tri jaroj, po du Komitatanoj ĉiujare.

Por elekti ĝeneralan Komitatanon Deleĝito havas tiom da voĉoj, kiom da membroj li reprezentas en sia loko;

2. Ses anoj elektitaj de la societo-membroj, por tri jaroj, po du Komitatanoj ĉiujare; kaj

3. Tri anoj elektitaj ĉiujare de la Kongreso³⁾. Latuta regado de la Ligo apartenas al la Ĝenerala Komitato, kiu, krom la rajtoj difinitaj de ĉi tiu statuto, havas la rajton fari ĉion, kio povas esti farata de la Ligo kaj ne estas malpermesata de rezolucio de la Ligo post ĝenerala voĉdono.

La Ĝenerala Komitato kunvenas laŭbezone kaj nepre unufoje ĉiujare dum la Internacia⁴⁾ Kongreso de Esperanto. La kongresanoj rajtas ĉeesti la kunvenojn de la Ĝenerala Komitato, sed ne rajtas voĉdoni.⁵⁾

La Ĝenerala Komitato enpezas kotizojn, abonojn kaj donacojn; starigas kazon kaj dispartigas la sumojn bezonatajn por la ĝenerala agado de la Ligo, por la subteno de la Lingva Komitato kaj Akademio, kaj por la „Oficiala Gazeto“, kaj por la funkcilgo de la Fakaj Komitatoj.

La Ĝenerala Komitato elektas ĉiujare el siaj membroj la Prezidanton kaj la Vic-Prezidanton de la Ligo. Ĝi ankaŭ elektas laŭbezone kaj ne neceso el sia anaro la Ĝeneralan Sekretarion, Ĝeneralan Kasiston kaj la honorajn membrojn. Ĝi rajtas elekti patronojn kaj honorajn prezidanton kaj vicprezidantojn.

Ĝi fiksas la ĝeneralan agadon de la Ligo laŭ ĉi tiu statuto kaj la deziresprimoj de la Kongreso. Privoĉdonas la jaran raporton kaj kontrolas la administradon de la kapitalo de la Ligo. Decidas pri apeloj kaj pri la aliaj aferoj al ĝi rezervitaj.

La Prezidanto reprezentas la Ligon en ĉiuj eksteraj, ne pure administrativaj rilatoj, kaj subskribas kun la Ĝenerala Sekretario ĉiujn gravajn dokumentojn. Li prezidas la Ĝeneralan Komitaton. Personoj aŭ ilin transdonante al la Komitato, li prizorgas la aliajn taskojn al li destinitajn per

ĉi tiu statuto. En gravaj kaj urĝaj okazoj li havas la kompetentecojn de la Ĝenerala Komitato, al kiu li raportas kiel eble plej baldaŭ. Vic-Prezidanto helpas kaj anstataŭas lin.

XI. Direktanta Komitato.

La „Direktanta Komitato“ (D. K.) konsistas el la Prezidanto kaj du Vic-Prezidantoj de la Ligo kaj la Prezidantoj de la Propaganda kaj Servada Komitatoj.

La Ĝenerala Komitato rajtas komisi al la Direktanta Komitato ĉiujn aferojn en sia kompetenteco.

La Direktanta Komitato agas konforme al la instrukcioj de la Ĝenerala Komitato pri ĉiuj aferoj komisiitaj al ĝi de la Ĝenerala Komitato aŭ per ĉi tiu statuto; kontrolas la Administradon kaj Redaktejon, administras la kapitalon de la Ligo, elektas redaktorojn kaj aliajn oficistojn kaj fiksas ilian salajron, kaj ĝenerale prizorgas la aferojn de la Ligo.

XII. Proponoj.

Ĉe elekto de la Ĝenerala Komitato, tri monatojn antaŭ la elekto, la Direktanta Komitato fiksas la daton por la ricevo de propono de kandidatoj kaj publikigas ĝin en la „Oficiala Gazeto“. Du Liganoj aŭ societo-membroj, rajtas proponi kandidaton kaj en la proponilo donas la detalajn informojn pri la kandidato, postulitajn de la Direktanta Komitato. La nomoj de la kandidatoj estas publikigataj en la „Oficiala Gazeto“ almenaŭ unu monaton antaŭ la voĉdono.

XIII. Voĉdonoj.

Ĝenerala voĉdono de la Ligo estas farata per la voĉoj de la Liganoj kaj societo-membroj.

La Liganoj voĉdonas pere de sia loka Deleĝito, kiu havas tiom da voĉoj, kiom da Liganoj li reprezentas.

Kiam estas okazonta ĝenerala voĉdono pri grava afero, estas rekomendate, ke Deleĝito alvoku siajn Liganojn kaj poste voĉdonu laŭ ilia deziresprimoj.

Ĉiu societo havas tiom da voĉoj, kiom da ĝiscentoj da membroj havas tiu societo.

Ĝenerala voĉdono okazas:

Se la Ĝenerala Komitato ĝin okazigas;

Se dudek Deleĝitoj aŭ societoj skribe postulas ĝin. La Direktanta Komitato ĝin aranĝas ne pli ol tri monatojn post ricevo de la postulo.

Ĝenerala voĉdono povas nulligi ĉiujn antaŭajn elektojn kaj decidojn, ŝanĝi la statuton aŭ dissolvi la Ligon.

Kutime dum oktobro-novembro la Direktanta Komitato okazigas ĝeneralan voĉdonadon:

por elekti la anojn bezonatajn por la Ĝenerala Komitato;

por decidi⁶⁾ pri la proponita ŝanĝo de la statuto;

por aliaj aferoj, laŭ decido de la Direktanta Komitato aŭ la iniciativo de la Liganoj aŭ societoj.

Ĉiun aferon submetotan al ĝenerala voĉdono publikigas la Direktanta Komitato en la „Oficiala Gazeto“ almenaŭ unu monaton antaŭ la tempo-liko por la voĉdono.

Por la rezulto valoras la plimulto de ĉiuj voĉoj. La voĉojn kontrolas la Direktanta Komitato. La Ĝenerala Sekretario certigas la korektecon de la procedo.

XIV. Organizo de Komitatoj.

La Ĝenerala Komitato, la Direktanta Komitato kaj ĉiu Faka Komitato rajtas fari regularon necesan por sia interna funkciado. Ĉiu Faka Komitato devas submeti sian regularon aŭ amendon de regularo al la Direktanta Komitato por aprobo, antaŭ ol tiu regularo aŭ amendo fariĝos definitiva. Ricevinte novan regularon aŭ amendon de regularo, la Direktanta Komitato publikigas ĝin en la „Oficiala Gazeto“; kaj, se neniu kontraŭstaras, ĝi fariĝas definitiva post tri monatoj de la dato de tiu publikigo. Ĝis kiam alta regularo estos al-

¹⁾ Esperantista.

²⁾ Esperantista.

³⁾ Kondiĉe, ke okazu unu kongreso ĉiujare. Se ne, kiel oni faros?

⁴⁾ Universala, kaj ne internacia ekzistas aŭ povas ekzisti multaj internaciaj kongresoj, sed nur unu Universala Kongreso.

⁵⁾ Tio ankaŭ supozigas, ke Universala Kongreso okazos ĉiujare.

⁶⁾ Eventuale.

prenta, la estanta regularo de la diversaj jam ekzistantaj fakoj aplikiĝas, krom en la okazo se ili malakordas kun ĉi tiu Statuto.

Ĉiuj komitatoj de la Ligo laboras per rondiranta kajero aŭ per cirkuleroj. Ili kunvenas ĉiujare je la tempo de la Kongreso⁷⁾, la Direktanta Komitato se eble pli ofte. Ĉe kunvenoj, demandoj estas decidataj de la plimulto de voĉoj de anoj ĉeestantaj aŭ reprezentataj de rajtigataj anstataŭuloj. En okazo de voĉegaleco decidas la prezidanto de la kunveno.

Ĉiu komitato rajtas submeti demandon al siaj anoj por poŝta baloto, kaj difini tempon por respondo. En tiu okazo la sekretario de la komitato sendas la demandon al ĝiaj anoj, laŭ la formo aprobita de la komitato, kaj la voĉoj ricevitaj havas efikon de voĉoj donitaj en kunveno.

Kiam ne malpli ol dek anoj de tiu komitato malaprobas iun decidon de tiu komitato kaj skribas al la sekretario en unu monato post la dato de la „Oficiala Gazeto“, kiu entenas la decidon, la sekretario de la komitato submetas la decidon, laŭ la formo aprobita de la prezidanto de la komitato, al ĉiuj anoj de la komitato por poŝta baloto. La decido estas konfirmata aŭ nuligata laŭ la baloto. Se la voĉoj estas egalaj, la decido restas.

Skriba decido, submetita al ĉiuj anoj de tiu komitato kaj subskribita de tri kvaronoj de la anoj, havas saman efikon, kiel decido en plena kunveno, kaj estas raportata al la sekvanta kunveno.

Ĉiu komitato havas la rajton starigi apartan kazon por sia propra funkciado, kaj devas ĉiujare submeti al la Direktanta Komitato budĝeton por la sekvanta jaro. Ricevinte budĝeton de ĉiu komitato, la Direktanta Komitato difinas sumon por tiu komitato el la kotizoj de la membroj kaj el la ĝenerala kaso. Krom tio ĉiu komitato povas akcepti subtenon de la Societo de Amikoj de Esperanto, aŭ de aliaj societoj, aŭ de privataj personoj; sed ĝi ne rajtas fari ĝeneralan peton al la membroj de la Ligo por mousubteno, sen aprobo de la Direktanta Komitato.

La ĝeneralaj rajtoj de ĉiu komitato de la Ligo ampleksas rajtojn:

1. Kontrakti en sia propra nomo, dungi kaj maldungi sekretariojn kaj aliajn pagitajn oficistojn kaj fiksi iliajn salajrojn.

2. Delegi, laŭ difinitaj kondiĉoj, ĉiujn siajn povojn al sub-komitatoj, konsistantaj el membroj de la Ligo, kaj fari regularon por la agado de tiaj sub-komitatoj.

3. Trakti aferojn kaj peti skribi ĉe registaroj, parlamentoj kaj publikaj korporacioj en la nomo de la Ligo.

4. Plenigi mankojn kaŭzitaĵojn de morto, ekzigo, aŭ forigo de iu komitatano aŭ oficisto. La anstataŭanto tiel elektita agos por la sama tempolimo, kiun rajtis agi la anstataŭito.

Estas rigardataj kiel ekzistantaj el iu komitato de la Ligo:

1. Ĉiu ano dufoje sinsekve ne respondinta al leteroj aŭ cirkuleroj, ne partopreninta en voĉdonoj, kaj ĝenerale montrinta indiferentecon pri sia ofico;

2. Ĉiu ano publike kontraŭbatalinta Esperanton;

3. Ĉiu ano pro malĝusta ago kondamnita de iu leĝa juĝistaro al puno de malliberejo.

4. Ĉiu ano ĉeanta esti membro de la Ligo.

En ĉiu okazo, la ekzigo estas decidata nur post esploro de la klarigoj de la intereso kaj la decido devas esti konfirmata de la Ĝenerala Komitato.

⁷⁾ Se kongreso okazas.

XV. Centra Administrejo.

La „Centra Administrejo“ de la Ligo estas loko, difinita de la Ĝenerala Komitato, en kiu la ĝenerala agado de la Ligo centriĝas, kaj en kiu funkcias la Direktanta Komitato kaj la Ĝenerala Sekretario. La Ĝenerala Komitato povas difini oficejojn en iuj ajn landoj plej taŭgaj por la funkciigo de la Fakaj Komitatoj.

XIV-a Universala Kongreso de Esperanto

kaj

VIII-a Kongreso de Universala Esp. Asocio

en Helsinki-Helsingfors, Finnlando

8.—16. aŭgusto 1922.

Deka Komuniko.

1. Alveturo kaj reveturo.

Sanĝita prezo en II. kl. sur la ŝipo „Rügen“: Stettin—Helsinki 3200 gmk; Helsinki—Stettin 600 fmk. Korekto: Tallinn—Helsinki: nur tro aŭ reveno kostas ne 800 emk. sed 80 fmk.

2. Novaj vojoj.

Tre malkara veturebleco por tiuj, kiuj intencas resti en Finnlando pli longe ol estas eble partoprenante en Lübecka karavano: Holtenaŭ (Kielkanalo)—Helsinki per „Arcturus“ (la 5. aŭgusto frumatene) aŭ „Astraea“. Ĉiuj abate frumatene. Prezo III kl. 280 fmk. kun liito kaj manĝo. Reveturo ĉiumerkede, sama prezo. Agento: Gläcke & Henning, Holtenaŭ.

3. Klimato kaj temperaturo.

Somera klimato de Helsinki estas agrabla, duonmara. Meza temperaturo dum julio + 17 C, dum 1.—16. aŭgusto + 15,8 C. Do la sama kiel en norda Germanujo, Nederlando kaj ĉe la Kanalo. Por mara vojaĝo estas necese kunpreni varman mantelon.

Rim. de Red.: Por konservi la akto lecon, la plej ŝatatan preferon de nia ĵurnalo, ni devas en la hodiaŭa numero anstataŭ la literaturan parton per gravaj komunikoj kaj raportoj pri la movado, alvenintaj lastmomente. En la venonta numero ni rekompencos la literaturamantojn.

La Centra Administrejo estas gvidata de la Ĝenerala Sekretario, kiun helpas sekretarioj kaj laŭbezone, oficistoj.

En la Centra Administrejo estas konservataj la fundamentaj kaj oficialaj dokumentoj de la Ligo, kaj el ĝi estas eldonataj la „Jarlibro“ kaj „Oficiala Gazeto“.

XVI. Ĝenerala Sekretario.

La „Ĝenerala Sekretario“ havas la devon plenumi ĉion postulitan de ĉi tiu statuto por esti farata de li, kaj agi laŭ la regularoj de la Ĝenerala Komitato kaj la Direktanta Komitato.

XVII. Kaso.

La „Centra Kaso“ estas administrata de la Ĝenerala Kasisto kun la helpo de la Ĝenerala Sekretario. Tiu kaso prizorgas la kutimajn spezojn de la Ligo. Ĝi ricevas la kotizojn, abonojn, flankajn gajnojn, kaj la donacojn, kaj pagas ĉiujn salajrojn de la Centra Administrejo kaj Redakcejo, kaj la sumojn dispartigitajn por la Lingva Komitato kaj Akademio, kaj la diversaj komitatoj kaj fakoj de la Ligo.

La Direktanta Komitato kaj ĉiu komitato kaj fako povas starigi garantian kapitalon laŭ kondiĉoj kaj reguloj aprobitaj de la garantiantoj.

La kapitalo de la Ligo estas administrata de tri ĝis kvin kuratoroj nomataj de la Ĝenerala Komitato. Tiu kapitalo formas la ĝeneralan rezervon de la Ligo, el kiu ĝi kreas novajn aranĝojn aŭ pagas jarajn defecitojn. Spekulado kun la havaĵo de la Ligo estas nepre malpermesata.

XVIII. Propaganda Komitato.

La „Propaganda Komitato“ konsistas el la ses reprezentantoj, kiujn la societo-membroj elektas al la Ĝenerala Komitato.

Ĝi administras la Centran Propagandon.

La „Centra Propagandeco“ de la Ligo havas lokon ĉe 51, rue de Clichy, Parizo. Ĝi povas esti translokita en iun ajn alian lokon, laŭ decido de la Ĝenerala Komitato.

En la Centra Propagandeco estas konservataj la arkivoj de la Esperanta movado kaj la oficiala biblioteko.

La Propaganda Komitato en ĝi organizas la propagandon ĉe registaroj kaj publikaj institucioj, la eldonadon de propagandiloj, kaj la kolekton de informoj kaj statistikoj pri la disvastigado de Esperanto.

⁸⁾ La Centra Propagandeco daŭrigas la laboron kaj sekvas la tradicion de la Esperantista Centra Oficejo (sekcio B) interkonsente kun la regularaj posedantoj de la havaĵo de tiu oficejo.

XIX. Servada Komitato.

La „Servada Komitato“ konsistas el la ses reprezentantoj, kiujn la Ligo elektas al la Ĝenerala Komitato.

La Servada Komitato prizorgas la disvastigadon de la praktika kaj aplika uzado de la lingvo por komercaj, sciencaj, kaj intelektaj celoj. Ĝi daŭrigas la laboron kaj sekvas la tradicion de la Universala Esperanto Asocio. Ĝi rajtas organizi la servojn de la delegitoj por siaj celoj, kaj formuli instrukciojn kaj regulojn por ili. La instrukciojn kaj regulojn devas aprobi la Direktanta Komitato.⁹⁾

⁹⁾ Jarlibro. Mi opinias, ke unu el la plej gravaj iloj de propagando kaj uzado de lingvo Esperanto estas Jarlibro, sub formo de Adresaro, kiu donas la nomojn kaj adresojn de ĉiuj personaj anoj de la Ligo, klasifikataj laŭ lokoj kaj laŭ profesioj. Ne estas eble „plifaciligi rilatojn inter homoj“, se oni ne konas nomojn kaj adresojn de homoj, kun kiuj oni povas rilati.

XX. Oficiala Gazeto.

La Ligo eldonas je sia risko kaj profito „Oficialan Gazeton“, kiu estas la oficiala organo de la Lingva Komitato kaj Akademio, kaj de la Ligo kaj de ĝiaj komitatoj kaj fakoj, kaj ĝenerala informilo pri la Esperanta movado.

4. *Kunpreni* laŭ ebloj nacian kostumon, nacian kaj Esperantan standardon. Personoj, kiuj povas pruntericevi de Esperantistaj societoj standardojn por ornamo la kongresejojn, bonvolu havigi ilin kaj antaŭe informi nin pri tio.

5. „*Vojaĝado en Finnlando*“ estas nun presata kaj pretiĝos ĝis fino de junio.

6. Demandaro.

Por precize scii la dezirojn de la kongresanoj, ni sendis al ĉiuj aliĝintoj specialan demandaron, kiun ni petas tuj pleniĝi kaj resendi.

7. Pasportaj aferoj.

Kompletige al la antaŭa sciigo ni informas, ke la senformalaja vizo estas ricevebla por maksimume du-monata restado en Finnlando. Por pli longa restado estos necese peti permeson de guberniestro. — La vizkosto en Berlino estas gmk. 350 (kaj ne 50).

Grava faciligo. Kune vojaĝantaj personoj (ekz. anoj de sama societo ktp.), kiuj povas ricevi kolektivajn pasportojn de siaj aŭtoritatoj, ricevas ankaŭ la vizon kolektive, pagante nur kiel por unu persono. Sola kondiĉo: samtempa transiro de la landlimoj.

8. Novaj aliĝprezoj.

Markoj:
Finnlandaj 75,—; germanaj 90,—; litovaj 90,—; estonaj 225,—; polaj 750,—.

Kronoj:
Svedaj 30,—; danaj 30,—; norvegaj 30,—; ĉeĥoslovakaj 90,—; aŭstria 450,—; hungaraj 225,—.

Frankoj:
Finnlandaj 37,50; belgaj 37,50; svisaj 30,—.

Levoj:
Rumanaj 90,—; bulgaraj 90.

Oficialaj avizoj en ĝi estas sufiĉaj por membroj kaj delegitoj, por la naciaj kaj fakaj societoj kaj iliaj reprezentantoj, kaj por ĉiuj komitatoj kaj fakoj kaj iliaj membroj.

Ĉar ne estas eble, pro la mondvasta agadokampo de la Ligo, ke avizo pri io farota atingu ĉiujn membrojn en plena tempo, estas konsentite, ke sufiĉas tempolimo de unu kalendra monato de la dato de ĝenerala poŝtelsendo de la „Oficiala Gazeto“.

Se izolaj Ligoj pro eraro aŭ pro alia kaŭzo ne ricevas la „Gazeton“, tio ne malvalorigas la avizon aŭ decidon alprenotan.

XXI. Kongreso.

La Ĝenerala Komitato organizas ĉiujare, kun la helpo de Loka Komitato, „Universalan Kongreson de Esperanto“, kaj fiksoj ĝian lokon, tempon, kaj kondiĉojn.

En la Universala Kongreso de Esperanto povas partopreni ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto, tute egale por kiaj celoj li ĝin uzas“, kondiĉe ke tiu persono:

a) sendis sian aliĝon al la Loka Komitato, kaj b) pagis la kotizon.

La aliĝo al la Kongreso komprenigas akcepton de ĉi tiu statuto kaj de la Kongresa Regularo.

La celo de la Kongreso estas la esploro de ĉiuj demandoj komuninteresaj por ĉiuj Esperantistoj, kun escepto de religiaj, politikaj, kaj sociaj demandoj, kiuj estas netuŝeblaj en Kongresa kunsido, kaj de lingvaj demandoj, kies esploro kaj solvo estas rezervataj al la Lingva Komitato kaj Akademio.

La Kongreso neniel rajtas alpreni decidojn devigajn, ĉu por izolaj Esperantistoj, aŭ por la Esperantistaj societoj, aŭ por la Ligo, sed ĝi plene rajtas esprimi dezirojn kaj konsilojn.

Por decidigi pri tiuj dezirospimoj aŭ konsiloj la Direktanta Komitato, kiel eble plej baldaŭ nepre devas submeti ilin al la Ĝenerala Komitato aŭ alia koncernata komitato, aŭ, se la afero tuŝas statuton, al ĝenerala voĉdono de la Ligo.

La regularo de la Kongresoj estas fikсата de la Ĝenerala Komitato, kiu rajtas ŝanĝi ĝin de tempo al tempo.

Eventuala profito el Kongreso estos dividota en tri egalajn partojn: 1-e al la propaganda societo de la lando, kie okazis la Kongreso; 2-e al la ĝenerala kaso de la Ligo, por pagi defecitojn de antaŭaj aŭ estontaj kongresoj; kaj 3-e al la ĝenerala kaso de la Ligo por ĝiaj ĝeneralaj celoj.¹⁰⁾

¹⁰⁾ Mi persistas pensi, ke la laboro pri organizo de ĉiujara kongreso estas sufiĉe grava por konservigi Kongresan Komitaton (K. K. K.) ĉar mi speras, ke tiu komitato havos multe da laboro.

XXII. Rajtigitoj.

Ĉiu persono, kiu rajtas ĉeesti kunvenon (ĉu de la Ligo, aŭ de iu ĝia komitato aŭ sub-komitato) povas reprezenti samrajthavan personon, kaj povas, al sia propra voĉo, aldoni la voĉon de tiu persono, kondiĉe ke li donu skribrajtigilon je la komenco de la kunveno al ĝia prezidanto aŭ sekretario.

XXIII. Raportoj kaj Kontoj.

„Raportoj“ pri la agado de la Ligo kaj bilancoj ĝis la fino de Marto estas publikigitaj en „Oficiala Gazeto“ ne pli malfrue ol en la monato junio.

Kontrolistoj de la Kontoj nomas la Ĝenerala Komitato.

XXIV. Havaĵo.

La havaĵo de la Ligo estas destinata por la Esperanta movado. La membroj nek havas personan rajton je tiu havaĵo, nek estas respondataj por ŝuldoj de la Ligo. En la okazo de likvidado de la Ligo, ĝia havaĵo estas disponota laŭ la decido de la Sekretario de la Ligo de Nacioj, aŭ de persono difinita de li.

Brita imperio 30,—; Nederlando 18,—; Hispanio 30,—; Italio 45,—; Grekio 120,—; Jugoslavio 120,—; Latvio 225,—; Usono 6,—.

9. Ekzameno por supera diplomo.

Kaŭze de peto de kelkaj eksterlandanoj, Esperanto Instituto de Finnlando aranĝos laŭ ebloj kaj espereble kune kun germana kaj brita Esperanto-institutoj ekzamenon por personoj, kiuj volas akiri la superan diplomon, La skriba verkajo devas alveni minimume 2 semajnojn antaŭ la kongreso. Postuloj de Esperanto-Instituto de Finnlando riceveblaj laŭ peto.

10. Fakaj kunsidoj.

Ĝis nun planataj:
Absinuloj, Blinduloj, Fervojistoj, Filatelistoj, Foiroj, Inĝenieroj kaj teknikistoj, Instruistoj, Juristoj, Journalistoj, Katolikoj, Komerclistoj, Kooperativanoj, Kristanoj, Kuracistoj, Laboristoj, Liberpensuloj, Malgrandanciuloj, Pacifistoj, Poŝtistoj, Sciencistoj, Skoltoj, Spiritistoj, Sportistoj (labor., burĝ.), Stenografistoj, Studentoj, Teozofoj kaj Framasonoj, Vegetaranoj kaj Ĉastemuloj. Adr.: ĉiuj ĉe la L. K. K.

11. Ekskurso al Petsamo.

Ĉar tre malmultaj personoj anoncis sin al tiu ekskurso, ni devas lasi ĝin kiel ilian privatan aferon. La interesatoj povas ricevi ĉiujn necesajn informojn de s-o Honoratus Bonnevie, Bergsliang. 11. II. Kristiania, Norvegujo, kien ili devas alveturi plej laste la 15-an de julio por alveni sufiĉe frue al la kongreso. Tamen se ili deziras vidi la meznoktan sunon, ili devas esti en Vardö plej laste la 16-an nokte, kaj pro tio elveturi el Kristiania la 10-an. En Petsamo donas konsilojn U. Holapainen, telegrafrevizoro.

12. Programo de la XIV-a.

L. K. K. proponis al K. K. K. sekvantan programon: 8. 8. kunsidoj de L. K. K., K. K. K., laŭ nacioj, fakaj kunsidoj, interkonataj festoj. 9. 8. Diservoj, solena

Karavano Lübeck—Helsinki.

Post kiam la landaj Esperantokongresoj nun plejgrandparte estas okazintaj, ni direktas niajn interesojn al la plej granda festo de la Esperantistaro: al la Universala Kongreso de Esperanto. Ĝi okazos ĉi tiun jaron en Helsinki, en lando, kies ĉarmoj allogas treege ĉiun, kiu iam aŭdis pri ĝi, kies vizito tamen estas iom malfaciligata, ĉar ĝi estas atingebla nur per ŝipo. Por ebligi la vojaĝon al kiel eble plej multaj gesamideanoj — ankaŭ el la malbonvalutaj ŝtatoj — la Lübecka Esperantistaro decidis, kolekti kaj gvidi karavanojn je plej favoraj kondiĉoj al la kongresurbo. To estas tre respondeca kaj tial zorgeme pripensita entrepreno, ĉar koncernas projekton de multaj milionoj da markoj. Tial oni ne povis starigi la planojn laŭ Esperantista maniero — bazitaj nur sur deziroj kaj esperoj — sed estis necese agi laŭ komercistaj principoj. Ni faris tion, intertraktante kun kelkaj seriozaj ŝipkompanioj. Tiuj konsentis dum aŭtuno de la pasinta jaro, sed post longaj diskutadoj ill dum la lasta monato reprenis siajn promesojn pretekstante, ke pro la atendota dum ĉi tiu somero vigla trafiko ili ne povus fordoni iun ŝipon. Do ni denove komencis serĉi, kaj fine ni sukcesis kontrakti kun grava germana ŝipkompanio (Sloman). Jen la kaŭzo, kial ni tiom longe ne publikigis ion pri nia karavanprojekto. Nun la afero estas certa. La ŝipkompanio ludonos al ni la ŝipon „Helgoland“, duŝraŭban vaporŝipon por pasaĝeroj (nuntempe veturanta Norvegujo), kiu povas porti 450 personojn. Por garantiita la partoprenantoj kiel eble plej multan komforton, ni limigis ĉi tiun nombron je 300. La vojaĝo komenciĝas la 5-an kaj finiĝos la 19-an de aŭgusto en Lübeck. La detalojn vidu en la prospekto, apudmetita al ĉi tiu gazeto aŭ havebla ĉe la subskribinto! Pliajn ni publikigos en venontaj n-oj de ET. Laŭ niaj planoj la karavanoj formos grandan familion kun egalaj rajtoj kaj devoj. Ni loĝos kaj manĝos kune. Ni dormos en kelkaj grandaj salonoj, apartaj por sinjoroj kaj por sinjorinoj. Kiu bezonos pli grandan komforton, povas lui (por 3000 mk.) lokon en kajuto por 2—4 personoj. Bedaŭrinde la ŝipo enhavas nur malmulte da tial kajutoj, sed estas eble, ke la ŝipkompanio enkonstruas pliajn laŭ bezono. La kosto por la tuta vojaĝo: la tien-kaj reenveturado, la loĝado kaj manĝado sur la ŝipo de la 5-a ĝis 19-a de aŭgusto, estos 6500 mk. (Tio estas laŭ antaŭmilitaj prezoj 150 mk.). Ĉar en la nuna tempo pro la daŭra ŝanĝo de la valuto kaj de la elspezoj ne estas eble, fiksi la prezojn por longa tempo, la nomitaj sumoj valoras nur laŭ la nuna stato de la financoj. Se la germana valuto, aŭ la prezoj por karbo kaj nutraĵoj, aŭ la salajroj grave ŝanĝiĝos ĝis la komenco de la vojaĝo, la kotizajo estos pli- aŭ malpli alta. La sama okazos, se la nombro de 300 partoprenantoj ne estos atingata, sed tio ne estas timebla, ĉar estas permesate, ke ankaŭ ne-Esperantistoj kiel gastoj — sed sub la samaj kondiĉoj — partoprenu. La plej grava afero estas, ke vi tuj aliĝu kaj sendu la monon, ĉar la ŝipkompanio postulas de ni tujan pagon de 800000 mk. Tiu sumo facile estos pagebla, se 80 gesamideanoj sendas la kotizajojn; ĝis nun (9. de junio) nur 50 aliĝis, do mankas ankoraŭ 30. Ĉu nia grava entrepreno devos pereji per la prokrastemo de la Esperantistoj? Se iu el la aliĝintoj estos malhelpata lastmomente por iuj kaŭzoj partopreni nian karavanojn, li ricevos la pagitan sumon krom 200 mk., kiuj estos jam uzitaj por ĝeneralaj spezoj.

Vi demandos, kiom kostas nun la tuta afero: vojaĝo kaj partopreno al kongreso en Helsinki? Kalkulu jene: La partopreno al la karavano kostas 6500 mk. Ĉar la ŝipo en Helsinki servos por vi kiel hotelo, vi tie bezonos krom tio nur ĉ.

malfermo, fakaj kunsidoj, kantkoncerto (mikŝtira koruso). 10. 8. Laborkunsido, kunsido de U. E. A., festo en Nacia Teatro. 11. 8. Laborkunsido, fotografado, komuna tagmanĝo. 12. 8. Kunsido de U. E. A., fakaj kunsidoj, kanikoncerto (virkoruso). 13. 8. Ekskursoj. 14. 8. Laborkunsido, fakaj kunsidoj, kostumbalo. 15. 8. Kunsido de U. E. A., fakaj kunsidoj. 16. 8. (matene) Solena fermo, ekskursoj, adiaŭo.

13. Antaŭkongresoj.

En Danzig tritaga programo kun adiaŭo al la veturontoj al Helsinki. Antaŭkongreso en Hamburg-Lübeck kaj karavano al Helsinki. 2. 8. Hamburg. Renkonto en restoracio Alsterlust, Vizito de vidindaĵoj. Biersperoj kun oficialaj salutoj. 3. 8. Lübeck. Salutkunveno en Stadthaus. Vizito de vidindaĵoj. Vespera festo en „marmorsalono“ de la urba teatro. 4. 8. Festa tagmanĝo en „Ratsweinkeller“. Ekskurso per vaporŝipo sur Trave. Ballo en Israelsdorf. 5. 8. Forveturo al Helsinki tra „Neufahrwasser“, kie enŝipiĝos la partoprenantoj en la Danziga antaŭkongreso. Prezo de la ŝipveturo Lübeck-Helsinki-Lübeck kun loĝado kaj manĝo ankaŭ dum la kongreso gmk. 6500.

14. Novaj aliĝoj.

La ĝisnunaj aliĝintoj estas el la sekvantaj landoj:

Estonujo 96, Britlando 70, Germanujo 48, Ĉeĥoslovakio 48, Pollando 31, Italio 27, Nederlando 25, Aŭstrio kaj Francujo po 18, Svislando kaj Svedujo po 11, Hungario 10, Belgio 7, Litovio kaj Danlando po 5, Latvio 4, Hispanio 3, Jugoslavio, Rumanio, Aŭstralio, Algerio po 2, Norvegio, Usono, Kanado, Venezuelo, Urugvajoj, Turkio, Japanlando, Ruslando po 1, Finnlando 304. Entute 757 aliĝintoj el 30 landoj.

15. *Helpkongresanoj*: La ĝisnunaj entute 53.

16. *Garantia kapitalo*: entute fmk. 17,990.

1000—1500 mk. (por ekskursoj, festoj ktp.). La prezojn por la fervoja vojaĝo tra Germanujo vi trovos sur la 2-a paĝo de nia prospekto. La fervojajn prezojn el via urbo ĝis la germana landlimo vi mem scias. La partopreno al la antaŭkongresoj en Hamburg kaj Lübeck kaŭzas elspezojn da 800—1000 mk. Do oni povas taksii entute ĉiujn kostojn (depost la tago de la forveturo al la hejmurbo ĝis la reveno tien) dum 2—3 semajnoj por Anglo 15 funt., Dano 200 kron., Holandano 100 guld., Belgo ka. Franco 400 ĝis 500 frank., Sviso 200 frank., Germano 9000 ĝis 10 000 mk., Aŭstrio 400 000—500 000 kron., Ĉeĥo 2000 kron. La gesamideanoj el aliaj pli malproksimaj landoj kalkulu mem siajn elspezojn laŭ tiuj ekzemploj! Certe la ĝuo, partopreni universalan kongreson, estas pli granda ol la por tiu elspezita sumo da mono. Kelkaj samideanoj plendis pri tiu aŭ alia aranĝo en nia plano, ekz. pri la komuna loĝado aŭ manĝado. Sed ili forgesis, ke nur per tiuj aranĝoj estis eble, fiksi la kotizojn por la karavano tiel ekstreme malalta. Kiu deziras pli multe da komforto dum la vojaĝo aŭ en iu unuaklasa hotelo en Helsinko kaj en aliaj urboj, havigu ĝin al si — se li posedas sufiĉe da mono —, sed li pagu la duoblan aŭ multoblan sumon ol nia karavano postulas. Nur unu plendo estas trafa: Partoprenantoj al nia karavano ne povas ĉeesti la antaŭ- aŭ postkongresajn ekskursojn tra Finnlando ktp. Tamen ankaŭ tion ni ebligas. Estos permesate, al ĉiu partoprenanto, ke li vendu partojn de siaj rajtoj al alia kongresano: la tien- aŭ reenvojaĝado aŭ la restado sur la ŝipo en Helsinko. Ekzemple: Karavano deziras partopreni postkongresan ekskurson al vojaĝi tra Svedujo aŭ Danujo (anstataŭ Lübeck). Li povos vendi la reenvojaĝadon laŭ ambaŭ interkonsento al kongresano, kiu deziras, post la kongreso kiel eble baldaŭ reveni hejmen. Por faciligi tiajn interŝanĝojn, mi estas preta, per la dezirojn. Skribu do al mi, sciigante al mi la detalojn. (Aldonu monon por afranko!)

Pri la vojaĝo al Lübeck, pri ĉi tiu urbo kaj pri la internaciaj antaŭkongresoj mi raportos, se estos loko, en la venontaj numeroj de ET.

D-ro A. Möbusz, Lübeck.

Pri la Unua' en Pollando.

Arbeto, kiun, Majstro kara, Vi plantis ĉe Vistul-rivero, Elkreskis ĝis lazuro klara, Etendas branĉojn ĉirkaŭ tero. A. Grabowski.

Vere bele kantis nia neforgesebla bardo Grabowski. Kaj liaj profetaj vortoj pli kaj pli efektiviĝas, ĉar potence la kara arbeto jam etendas siajn branĉojn ĝis en la plej malproksimajn regionojn, en la plej nekongratajn lokojn de la kvin kontinentoj. Sed ĉiam malforta estis ankoraŭ la trunko. Polujo sen organizaĵo komuna, propagando kaj laborado sen iu certa direkto kaj propra celo. Sed finfine estiĝis nun novaj tempoj, okazaĵo grava en nia Esperanta movado: Dum Pentekosto (3., 4. kaj 5. junio) okazis la I-a Kongreso de Pollandaj Esperantistoj. Kune kun s-ano St. Feitke mi alvenis Varsovion sabato, la 3. junio, je 8 h. matene, direktante tuj miajn paŝojn al la akceptejo: Fotografejo „Secession“ ĉe str. Marszalkowska 123. Kvankam tiu ĉi ejo estis bona kaj simpatia, mi tamen konsulis esti pli singarda kaj estonte elekti pli grandan ejon. Tie ĉi la kongresanoj ricevis siajn dokumentojn: vere belan kongreskarton, programon kaj ĉarman kongresinsignon. Pli multe da laboro kaŭzis la destino de loĝejoj por la alveturintoj. La por ni du Bydgoszczanoj ĉe s-o Rozanykwiat provizitaj loĝejoj estis jam ekokupitaj de aliaj samideanoj. Fine ni ricevis pagitan ĉamburon en hotelo „Metropol“. Ankoraŭ antaŭtagmeze mi sukcesis iom rigardi la urbon. Gvidis min, la unuafino en Varsovio estantan, afable s-ano Strelczyk el Turek. Ĉie vivo, bolanta vivo, la homoj rapidas, rapidegas. Sur la ĉefstratoj oni estas vere premata. La senĉese laŭvice veturantaj tramvojoj, flakroj, aŭtomobiloj kaj veturiloj preskaŭ malebligas transi la straton al alia flanko. Vere grandurbo! Neniu atentis nin signitajn per la bela videbla kongresinsigno; same neniun interesigis pri la kongresafliŝoj fiksitaj ĉe la stralkolonoj: Ĉies kapo estas plenigita per aliaj aferoj, zorgoj kaj okupoj. Mi memoras esti leĝinta, ke oni ne aranĝu niajn kongresojn en tre grandaj urboj, ĉar nia Esperanto en ili tute perdis, farante preskaŭ neniun propagandon. Kaj efektive tiel estas! — Paŝante tra str. Królewska, ni ne povis rezigni je vizito de la vidvino de nia kara Majstro. Modesta ŝildeto kun surskribo: Dr. Adam Zamenhof sur domo 41 de la str. Królewska jam anoncas, ke jen estas la domo, kie vivis, laboris kaj mortis nia Majstro. Akceptis nin s-ino Klara Zamenhof, ĉiam afabla, per maljuneco jam iom teren klinita, sed tamen ankoraŭ vigla, esprimis sian ĝojon, ke urbo Bydgoszcz tiel forte propagandas. Generale oni povis konstati, ke nia Majstrino estas tre bone

17. *Donacoj ricevitaj de LKK* entute fmk. 72 193.66.

18. *Blindula kaso*: Por la eldona kaso de la blindaj Esperantistoj entute fmk. 1783.52.

19. *Aĉentu*.

Reveturajn biletojn por ĉiuj linioj kaj tempoj, ekster la Lübecka karanŝipo zorgos LKK. Mendo alvenonta ses semajnojn antaŭ reveturo, kun pago almenaŭ parta. Kompreneble ni akceptos mendojn ankaŭ post la fiksitaj templaĵoj, sed sen garantio pri certa ricevo de loko en la dezirata veturvico.

La Loka Kongresa Komitato.

informita pri la diversurba kaj -landa Esp. movado. La kelkajn minutojn, kiujn mi restadis en tiuj ĉi karaj ejoj, ornamataj per pentraĵoj, kusenoj kaj aliaj ornamaĵoj, ame donacitaj de la Esperantistaro tutmonda al nia kara Majstro, neniam foriĝos el mia memoro. —

Posttagmeze, en ĉeesto de 400—500 personoj okazis la solena malfermo de la kongreso per kolonelo prof. D-ro Odo Bujwid. Sur la malantaŭaĵo de la podio staras meze de Esp. flagoj, florkronoj kaj verdajoj la Zamenhofa busto, memoriganta al ĉiuj ĉeestantoj la mildajn trajtojn de tiu granda homaramanto. Silento... Per mallaŭta ĝojplena voĉo tremanta parolas s-ano Bujwid pri la historia momento. Ree silento... La estradon de la prezidantaro suriras sub aplaŭdo s-ino Klara Zamenhof kaj la reprezentanto de nia registaro Pilsudski, s-o generalo Jacyna. Nun parolas la reprezentanto de la pola Ministrejo Eksterlanda. Salutinte la kongreson en la nomo de sia ministrejo, li invitas la venontan mondkongreson al Varsovio, promesante samtempe ĉiun ajn subtenon flanko de la registaro. „Esperanto havas grandajn meritojn por Polio, ĉar per ĝi pola kulturo disiradas en la mondon“, tiel li diris. La ĉeestantaro dankas al li per brua aplaŭdo. Sekvas nun laŭalfabete salutoiroj de delegitoj de pli ol 24 urboj de Polujo. Interalie oni nun ankaŭ ekscitis, ke ĉeestas s-ano Waszek el Ĉeĥoslovakio, kiu parolas en la nomo de la Esperantista laboristaro de la Teŝena Silezio.

Sed jam aŭdiĝas voĉo de nia lerta poeto kaj brila oratoro Leo Belmont: „Mi salutas vin, samideanoj! konkurintaj el ĉiuj regionoj de tuta Pollando en ĉefurbo Varsovio. Mi salutas vin! — infanoj de ideo de nia Majstro, forĝistoj de nevideblaj fadenoj de spirita telegrafo. Mi salutas vin! ravitaj amikoj de milkorda harpo de Antoni Grabowski. Kiel honora membro kaj vicprezidanto de la Organiza Komitato mi salutas vin, kunkrimuloj kaj kuntrompuloj! Jes! ĉar ni ĉiuj kune trompis nian ŝatindan registaron: forpuŝinte ĉiujn formalajojn, ne aĉetinte pasportojn, ni kuraĝege veturis post limon — en Esperantujon, pendigintan en nuboj!... Ĉar ni estas nun en nova lando, sur nia kara Esperanto-insulo, malkovrita sur oceano!“ Neniu sono, neniu spiro; ĉiuj estas ravitaj per la ĉarmaj humorplenaj vortoj de l' oratoro, kiu plu parolas: „Teruraj krimuloj estas ni Esperantistoj... Ĉar niaj ŝatataj kontraŭuloj jam delonge ekforigis Esperanton kvazaŭ sentaŭgan mortulon... Nun rigardu! Ni elŝtelis ĝin el la tombo, ni faris kun la mortulo malpermesitan magian operacion — nia kadavro laŭvere vivas... tre bone spiras, bonege sonas kaj tute ne volas morti. Obstinu vivpovega kadavro estas tiu Esperanto! Abomena fantomo, kiu terurigas niajn kontraŭulojn, festeninte dektri tutmondajn kongresojn, jen fine, post morto alvenas Varsovion, ke ĝi terurigu nin en nia agrabla sonĝo, ke helpa lingvo internacia de Zamenhof jam ne ekzistas en mondo!“ Kaj dum oni naŭve pensas, ke vi invitas viajn gastojn por funebra festo de Esperanto, okazas, ke ĝi estas ĝoja festo sub alta protekto de nia registaro, edziĝa festeno de l' Esperanto kun Polio.“ Senĉesa aplaŭdo dankis al la paroladinto, kaj ĝoju ni Esperantujanoj, ke ni posedas tiun lertan oratoron.

S-anino D-ro Muszkatblat legas alvenintajn telegramojn kaj salutleterojn. Interalie mi memoris nur tiujn de generalo Sebert, s-ino Cense, s-o Warden, prez. de Brita Esp. Asocio, kaj de urbestro Rzewski. Multe post 7 h. finiĝis la malferma kunsido.

Mi devis rapidi je l' vespermango, alie mi ne venus ĝustatempe al la anoncita koncerto je 8 h. okazonta en la kongresejo. La brue vizitata koncerto de la plej bonaj Varsoviaj geartistoj kiel Balinska, Niemojewska, Ocetkowska kaj prof. Urstein (ĉiuj kantoj estis Esperantilingvaj) havis plenan sukceson. Post okazinta koncerto mi iris mortlaca al mia loĝejo por min fortigi per dolĉa dormo por la venonta tago.

La 4. junio je 10 h. antaŭtagmeze ĉiuj kolektiĝis sur la hebrea tombejo por honori la Majstron per metado de bela florkrono sur lia lasta ripozejo. Belege paroladis s-o Belmont, kuruŝaj estis liaj vortoj ĉe la modesta tombo de nia Majstro, vortoj, sentigantaj, kiel bone kaj kiel profunde konis Belmont la grandan homaramanton Zamenhof. Post okazinta fotografado faris parto de la s-anaro (interalie mi) privata unuoran ekskurso tra tramvoje al la granda kaj bela Poniatowski-ponto, trans kiun ni piedmarŝis por atingi la bordon de l' Vistul-rivero. Sed ni devis rapidi por atingi la kongreselon, ĉar tie je 1 h. estas komenciĝonta la kunsido de rajtigitaj delegitoj.

Jus je nia alveno komenciĝis la kunsido, prezidata, en nomo de prof. Bujwid, de s-o Kuhl el Kraków. Ĉeestas 48 delegitoj reprezentantaj 27 organizaĵojn el 22 urboj. En la tagordo: Fondo de „Federacio de Esperantistaj Societoj en Pollando“. Oni diskutas 2½ horojn pri formalajoj kaj prokrastas la akcepton de la statuto por la dua delegitara kunveno, okazonta venontan tagon. Tiel oni disiris, nenion farinte.

Ne estis eble al mi jam ree (post duonhoro, t. e. je 4 h.) pro trolaciĝo ĉeesti la unuan plenan laborkunsidon de la kongreso. Mi nur aŭdis, ke oni interalie decidis inviti la XV-an Internacian Mondkongreson al Varsovio kaj okazigi la II-an Pollandan kongreson en Lodz. (Kelkajn antaŭe al mi faritajn privatajn proponojn, okazigi la II-an en Bydgoszcz, mi rifuzis lasante la okazigon de kongresoj unue al urboj kun pli longjara Esp. movado.)

Malfrue posttagmeze kune kun s-ano Strelczyk kaj St. Feitke mi veturis tramvoje al la katolika tombejo por viziti la tombon de nia kara Antoni Grabowski.

Vespere en lokalo de „Societo de Pola Instruistaro“ okazis — post prelego pri la „Geneva instruista konferenco“, farita de D-ro Czubrynski, reprezentinto pola ĉe la internacia konferenco pedagogia en Genevo — unua publika ekzameno de Pola Esp. Instituto por ricevi diplomon instruistan. La ekzamenon faris, ricevante diplomon, s-ano Cz. Pruski el Siedlce.

Venontan tagon, la 5. junio, okazis depono de 9 h. matene diversaj fakaj kunsidoj, kiel de UEA-anoj, laboristoj, Pola Esp. Societo, Konkordanoj, junularo kaj teozofoj. Mi sukcesis ĉeesti nur tiun ĉi lastan, kiu okazis en la sekretario de la revuo „Przegląd Teozoficzny“. La sekr. s-o Münch, cetere longjara sperta Esperantisto, promesis al mi de nun regule aperigi Esp. angulojn en la teozofia revuo.

Depost 11 h. okazis sub gvidado de s-o prof. Bujwid la vizitado de la famaj Varsoviaj filiriloj. Al la poste okazanta vizitado de urbaj vidindaĵoj kiel Muzeo Nacia, Kastelo, Domo de Baryczkow, Malnovurbo, Muzeo Militista kaj Lazienki, kio okazis sub sperta gvidado de s-o Lotto, mi bedaŭrinde ne povis partopreni, ĉar por eviti eventualan riproĉon, mi vole-nevole devis ĉeesti la duan kunvenon de rajtigitaj delegitoj.

Oni jam vigle diskutadis, kiam mi estis alvenanta. Fine oni interkonsentis, akceptante la statuton de la Federacio. La nuna el 6 Varsoviaj s-anoj konsistanta estraro, estas plivastigita ĝis 12 p., tiel, ke estras la novan Federacion ankaŭ 6 provincaj s-anoj. Prezidanto de la Federacio estas s-o prof. D-ro Bujwid.

Dum la dua kaj ferma kunsido de la kongreso je 4 h. posttagmeze oni interalie pridiskulis la eventualan eldonon de Esp. gazeto. Oni proponis la redaktadon kaj eldonadon de la eventuala gazeto por Bydgoszcz. La proponon oni transdonis por findecido al la estraro de l' nova Federacio... Kaj ĉarme, varme parolis ree nia Belmont finante sian paroladon per belega poemo, kiun sekvis ankoraŭ dua: Per belege aliĝinta himno „La Espero“ Belmont alvokis por mondonacado por la baldaŭ starigota monumento sur la tro modesta tombo de nia neforgesebla Majstro. Bonan aplaŭdon elvokis la Komuniko de s-ano inĝeniero Schnitzer el Lwów, ke la plej granda pola verkisto kaj poeto nuntempa Jan Kasprówicz fariĝis Esperantisto, promesante kiel rektoro de universitato en Lwów, starigi specialan universitatan Esp. fakon. Tiun ĉi grandan sukceson ni dankas al s-o Schnitzer kaj lia frato. Okazas monokolekto por la lernejaferoj (enkonduko de Esp.) laŭ la propono de s-o D-ro Czubrynski; oni ricevis kun antaŭa sumo entute ĉ. 50 000 pmk. Post kanto de „Espero“ kaj reciproka komuna adiaŭo, ĉiuj disiris kun ĝojplena koro pri la bele travivitaj tagoj.

Vespere okazis en salonoj de ges-oj Essigman raŭto, kiun ĉeestis interalie s-ino Zamenhof, s-o Libicki, reprezentanto de la eksterlanda ministrejo pola (parolanta cetere tre bone Esperanto), s-oj Bujwid, Kuhl, Belmont k. a. Ankaŭ s-on Feitke kaj min ges-oj Essigman bonvolis afable inviti. Ĉar tamen granda parto de l' samideanaro faris voporiŝpe privatajn ekskursojn sur la Vistul-rivero al Varsovia antaŭloko Bielany, ankaŭ ni preferis iom ĝui freŝan akvo-aeron. Post 11 h. nokte dum ora lumbrilo, jetanta siajn mildajn radiojn sur la ondigantan riveron, kaj gaja kantado de la „Espero“ kaj „Tagiĝo“ ni revenis. Venontan tagon post vizito de la Esp. ekspozicio, bele aranĝita en montrofenestro de la vendejo de „Renoma“ (posedanta s-o Klein), de Lazienki (banejoj) kaj Belvedero (loĝejo de regnestro Pilsudski) ni pasigis la vesperon laŭ deziro de ges-oj Essigman, en ilia hejmo kaj reveturis Bydgoszczon je 11 h. nokte, ĝis la stadiono afable akompanataj kaj helpataj de s-ano Lonkopolanski, al kiu mi esprimas ankoraŭ speciale mian koran dankon. — Mankis dum la kongreso la nepre necesa interkonatiĝa vespero, prezentado de malgranda teatraĵeto estus pli preferinda ol koncerto, mankis organizo en la loĝejaferoj, gazeta servo, kiel ankaŭ diversaj aliaj aferoj estus kritikindaj. Memorente tamen, kun kiel malfacilaj batalis la Varsoviaj samideanoj daŭre ekzistis malinterkonsento inter „Konkord“-anoj kaj „Pola Esp. Societo“-anoj, — laŭ privata scilgo eĉ unu tagon antaŭ la kongreso la tuta afero estis disfalonta, oni povas konsideri la I-an Pollandan kongreson kiel nepre bone sukcesintan, ĉar ĝi okazis sub signo de l' konkordiĝo, — la Varsoviaj samideanoj sin mem venkis, kaj tio estas la plej granda sukceso, decanta al veraj Esperantistoj. — Sed ni tutmonda Esperantistaro preparu nin al la venonta internacia mondkongreso en Varsovio, vizitanta multnombre la lulilon de Esperanto kaj ree:

Warszawaj muroj ĝoje sonos,
Dum lernantaro multnacia
Dankeme Majstro-tombon kronos
Per la verdaĵo laŭfolia.

Fr. Drengel, Bydgoszcz.

XI-a Kongreso

de la

Belgaj Esperantistoj.

4.—5. junio 1922 en St. Nikolao.

En la beleta industria urbeto kunvenis pli ol 200 belgaj gesamideanoj por partopreni tiun jarfeston. Ĉeestis ankaŭ tri nebelgaj Esperantistoj.

Sabaton vespere okazis kunveno de la estraro de la Belgia Ligo.

Dimanĉon matene ĉiuj kongresanoj arĝis antaŭ la stadidomo, kaj procesie, kun flirantaj standardoj, kaj kondukate de bona muzikistaro ili marŝis al

la domo de s-o Léon Scheeders, boneknota industrilisto de la loko, honora prezidanto de la Esperantistaj grupoj de S-ta Nikolao. Okazis tie la oficiala donaco de grupflago al la lokaj Esperantistoj. Mallonge parolis s-oj L. Scheeders, A. De Busschere, prezidanto de la lokaj grupoj kaj de la Organiza Komitato de la Kongreso, kaj ankaŭ s-o Witteryck, prez. de la Belgia Ligo. Antaŭ la domo la belega flago estis prezentata al la belgaj Esperantistoj, kiuj salutis ĝin per energie kantata „Espero“. La procesio daŭrigis sian promenadon tra la urbo, al la urbdomo. Alvenante sur la Grandan Placon (oni devus nomi ĝin „grandegan“ placon: ĝi estas la plej granda Grand Placo en Belglando), la kongresanoj ĝuis la agrablan surprizon aŭdi „La Espero“ ludatan per la sonorilaro en la urbdoma turo. Ni verŝajne ne eraras, dirante, ke estas la unua fojo, ke nia himno estas ludata per sonorilaro. En la bela urbdomo, la urbestro, s-o Desmedt per koraj vortoj bonvenigis la Esperantistojn. S-o Witteryck respondis kaj la urbestro proponis trinki la honorvinon je la sukceso de la klopodoj de la Esperantistoj en la tuta mondo.

Poste okazis la ĝenerala jarkunveno de la Belgia Ligo en la vasta salono de la Akademio. Speciala kortuŝa manifestacio de simpatio atendis la prezidanton de la Ligo, kiu revenas al ni post longa malsano. Interpretis tiuokaze la korespondon de ĉiuj belgaj Esperantistoj s-o L. Cogen, vicprezidanto, kiu anstataŭis lin dum lia deviga for-esto. Simple sed emocie s-o Witteryck dankas. Li malfermas la kongreson kaj faras sian tradician paroladon, plenan je entuziasmo kaj je espero por la estonto. Poste s-o H. Petiau, sekretario, legas sian raporton pri la agado de la Ligo, kaj s-o F. Mathieux, kasisto, informas la ĉeestantojn pri la financa stato de la nacia societo.

Fotografitaĵoj en la ĝardeno de la urba muzeo, la kongresanoj iris al salono „De Hoop“ (La Espero), kie okazos festeno. Toasto estis farata je la Reĝo kaj la reĝa familio, kaj precipe je la Princo Leopoldo, Honora Prezidanto de la Ligo. Aliaj toastoj estis elparolataj je la organizantoj, la ĉeestantaj fremdaj samideanoj, la Esperantistinoj, la belga gazetaro, ktp.

En la Akademia Salono daŭrigis la laboroj de la kongreso. Ĉi tiu akceptis malgrandan ŝanĝon en la Liga regularo, por plifaciligi la aliĝon de junulaj grupoj. S-o inĝ. L. Champy proponis, ke en la Esperantaj tekstoj oni ĉiam esprimu la mezurojn per la metra sistemo. La kunveno ankaŭ akceptis la proponon prezentitan de s-o Frans Schoofs pri elekto de lokaj delegitoj en urboj kaj vilaĝoj, kie ne jam ekzistas grupo. La celo de tiu aranĝo estas: plimultigo de la centroj de interesiĝo kaj de propagando, kaj favorado de starigo de novaj grupoj.

Vespere okazis granda ĝardenfesto — kiun la freŝa vetero tute ne helpis — en la Muzea ĝardeno, kie estis aranĝitaj: trinkejo, laktejo, dancejo, librovendejo, kaj precipe bone aranĝita ekspozicio de Esperantaĵoj.

Lunde, la kongresanoj pledis promenis al Temsche, ĉarma loko sur la bordo de la Skeldo, kie bonvenigis ilin la iliaj samideanoj sub la konduko de s-o Douven. — Ŝipa ekskurso de Temsche al Antverpeno, kiu efektiviĝis en la plej bonaj kondiĉoj kaj en la plej varma atmosfero de entuziasmo, fermis la kongreson. *Bravo.*

Fariĝu dumviva abonanto!

Jus pasis du jaroj, de kiam la unua regula numero de ET estis dissendita en la mondon. Depost novembro 1920, ET eliras regule ĉiusemajne. Depost 23. oktobro 1921 ĝi aperas en pli granda formato, sur glata papero kaj kun interesaj, aktualaj ilustraĵoj.

Eĉ ne unu fojon dum ĝia dujara ekzistado la aperado de ET estis interrompata, eĉ ne unu fojon dum ĝia ĉiusemajna elrado aperis tiel nomata „duobla numero“; ĉiuvendrede, kelkfoje eĉ jaŭde, ET estis ekspedita nepre regule kaj akurate (por fervoja striko ni ja ne estas respondaj). Kaj ni supozas certe prave, ke tiu nepre reguleco kaj akurateco, ĝenerale ne-kuitima ĉe la Esperanta gazetaro, ligite kun daŭra laŭlebla pliboniĝo de nia jurnalo, estis la ĉefa garantio por nia sukceso kaj gajnis al ni la simpatiojn kaj plenan konfidon de ĉiuj seriozaj gesamideanoj.

Sed ni ne volas dormi sur niaj laŭroj. Ni celas ĉiaman plibonigon de nia jurnalo, precipe laŭ teknika vidpunkto. Tial ni intencas krei specialan fondaĵon por plibonigi la teknikajn aranĝojn je ET, per verbado de dumvivaĵo abonantoj, je sekvantaj, tre favoraj kondiĉoj:

1. Kiu pagas unufoje sesoblan jarabonon de ET (germanoj, aŭstroj, baltikanoj, balkananoj kaj poloj pagu 1800 germ. mk.), rekte al nia eldonejo, per ŝtataj monbiletoj aŭ per bankĉeko, rajtas ricevi ET dum la daŭro de sia vivo. Grupoj, societoj ktp., kiu pagas la saman sumon, rajtas ricevi ET dum 20 jaroj.
2. La prezo komunikita en § 1 validas nur ĝis 31. julio (por ne-eŭropanoj ĝis 31. aŭgusto). Poste ĝi estos plialtigata je minimume 33 1/3 %.
3. La nomoj de la dumvivaĵo abonantoj resp. de la societo-abonantoj por 20 jaroj estos komunikataj en la (jubilea) numero 100* de ET (3. septembro 1922).

* La n-o 100 (jubilea numero) aperos speciale bele preta, minimume 6-paĝa kaj kun 16-paĝa blindebla literatura aldono enhavanta la komencon de interesa rakonto de St. St. Blicher „Taglibro de Vilagpedelo“, bonstille tradukita de H. J. Bulthuis. L. K.-ano, kaj rekomendita de Esp. Literatura Asocio (ELA)

Esperanto Service Corporation „ESKO“
 500 Fifth Avenue New York City
 Telegrafa adreso: Esperanto New-York.

Aĉeto, eksporto, importo kaj maklerado de ĉiuspecaj komercaĵoj.

Katalogoj, prezaroj kaj specimenoj estos danke ricevataj

Oni postula la „Victoria“-Eksport-prezliston en germana-hispana au germana-angla lingvoj.

Dr. Vogt'sche Bank, Stuttgart, Germ.
 Wallrathbau Komandit-Societo Friedrichstr. 13
 Telefono: N-oj 11458 kaj 11459. — Telegr.-Adreso: Bankvogt.

Aĉeto kaj vendo de valorpapiroj.
 Procentado de kontantaj deponoj.
 Aĉeto kaj vendo de fremdaj valutoj.
 Perado de ĉiuspecaj negocoj.

La Interŝanĝo

Franca kaj Esperanta revuo ilustrita por korespondantoj, interŝanĝoj kaj komercaj interrilatoj aperas sep fojojn jare, estas 32- aŭ 40-paĝa, ne enkalkulante la liston de la aliĝantoj sendatan nur al la abonintoj.

Jara abonprezo: 10 francaj frankoj.
 Specimena n-o: 1 franca franko aŭ 4 respond-kuponoj.

A. Bonnefous, Direktoro, **Béziers** (Hérault), Francujo, 3, rue du Capus, et 22, rue Viennet.

ET numero 100

(jubilea numero) aperas la 3-an de septembro 1922 en eksterordinare granda eldonnombro kaj minimume 6-paĝa, kun speciala 16-paĝa literatura aldono.

Al varbontoj de **ANONCOJ** (ne anoncetoj) por tiu ĉi numero ni konsentas **Rekompencon de 30%**

La prezo de anoncoj por tiu ĉi numero estas por ĉiuj landoj po centimetro-kvadrato 5 gmk., sed sen rabato por la anoncetoj.

Abonejoj de ET en la landoj

Aŭstra: Ferd. P. Huber, Münchberg 5, Salzburg; por Wien „La Esperantisto“ (d-ro E. Pfeiffer), Wien II/1, Postamt 54
 Belga: Frans Schoofs, 45, Kl. Beerastraat, Antwerpen. Poŝt-ĉeka n-o 384 80.
 Bulgara: Georgi Ĥr. Gaŝevski, Bul. Marie Luiza 46, Sofia.
 Ĉeĥoslovaka: Otto Sklenka, Hradec Kralové. Otto Lumpe, Trautenau.
 Estonia: Est. Esp. Unuiĝo, poŝtkast 6, Tallinn.
 Finna: O/Y. Movado A/B., Kasarminkatu 20, Helsinki.
 Franca: Esp. Centra Librejo, 81 rue de Cligny, Paris 9.
 Hispana: Konrado Doménech, Caldes de Malavella, prov. Girona, Vichy Catalan.
 Hungara: Paŭlo Balkanyi, Hajos-utca 15-II-2, Budapest VI.
 Japana: Morizo Ga, 16-V, Kitamači, Aojama, Tokio.
 Jugoslava: D-ro Dušan Maruzzi, Zagreb, Jezuitika ul., br. 1.
 Litova: Paŭlo v. Medem, Ŝmėlia g-ve 12, Kaunas (Kovno).
 Pola: Adolfo Oberholman, Krak-Przedm. 10, Warszawa. (P. K. O. n-o 5125). — Pola Esp. Servo (Fr. Prengel), Kordeckiego 1a, Bydgoszcz-Bromberg.
 Rumana: Esperanto-Oficejo Cluj.
 Sveda: Förlagsföreningen Esperanto, u. p. a., Stockholm 1
 U. S. A.: The Esperanto Service Corporation, 500 Fifth Avenue, New York City.

Anoncetoj.

Familiaj anoncetoj senpage. Aliaj anoncetoj (nur akceptataj por minimume du sinekvalaj enprezoj) kostas po du enprezoj kaj po 20 vortoj 0.20 dol., 0.50 fl., 1 nord. kr., 1 šll., 1 svls. fk., 1 pes., 2 franc. aŭ belg. fk., 5 llr., 7 fmk., 8 kc., 30 gmk., 75 hung. kr., 350 gmk., 500 aŭst. kr. internacie 5 r'amp. resp. kup.; ĉe rektaj abonantoj ri deprenas la pagon por anoncetoj laŭdezire de la abonkanto, de aliaj ni enprezas anoncetojn nur post antaŭpago. — Anoncetoj devas aŭteni 10 tagojn antaŭ publikigo.

GAZETKOLEKTAĴO, proka. 1000 div. ekzempleroj, 160 div. specoj, inter ili tre valoraj, malmultekoste aĉetebla ĉe Bihari Mór, Népszínház u. 27-IV-51, Budapest, Hung.

LA REVUO. Ni serĉas „La Revuo“, 7-a jaro n-oj 2 kaj 4, 8-a jaro n-o 10. Pagas altan prezon. — Martin Blicher, Bredgade 63, III., Kopenhago; Danlando.

UFA. — S-o Veterinaro N. Foss en Ufa, Puŝkinskaja 77, bonvolu sciigi al red. de ET, ĉu li ricevis gmk. 256. — kolektitaĵoj por li de Danziga Esp. Asocio kaj senditajn pere de Hungerhilfskomitee en Berlin.

V. PIMENOV en Naĉik. — Bonvolu sciigi, ĉu vi ricevis monon senditan al vi pere de Hungerhilfskomitee en Berlin.

KRIOJ DE L' KORO, de Salo Grenkamp-Kornfeld, afrankite gmk. 10. — „Unuaj Agordoj“, de Eliski kaj Eska, afrankite gmk. 20. — Liveras Eldonejo „Esperantista Voĉo“, Jaslo, Pollando.

PLI MALKARE OL ĈIE. — Kontraŭ referencoj ni forsendas poŝtmark-elektojn. Liverblaj de ĉiuj landoj, speciale polaj, ukrainaj, rusaj ktp. — Al demandoj aldonu por respondo! — Eldonejo „Esperantista Voĉo“, Jaslo, Pollando.

KONGRESA AFIŜO. Loka Kongresa Komitato sendos volonte la kongresan afiŝon senpage al dezirantoj por propagando. — XIV-a Universala Kongreso de Esperanto en Helsinki.

VIZITO AL BUDAPEST, Kongresanoj, kiuj volas dum la vojaĝo viziti Budapeŝton, bonvolu anonci al s-o Laquer Sandor, Budapest, Kiraly-utca 57-II-2.

LETERVESPERON aranĝas Societo Esperantista de Västerås „La Verda Stelo“, la 28-an de Julio 1922. Sendu tiuj lerojn kaj kartojn (markitajn: „Letervespero“) al s-o Q. N.: son Irborn, Fiskartorget 8, Västerås, Svedujo. Ĉiuj ricevos respondon.

Jus aperis
 eldonita de Ksiegarnia Robotnicza (Laborista Librejo), Warszawa, ul. Wspólna 17, Polio:

Ekzilo

Rememoroj de Aleksy Rzewski. Esperantigis kun permeso de la aŭtoro K. Domoŝlawski.

La aŭtoro, estinta Lodza laboristo, estis kiel fervora ano de socialista partio dum la revolucio de 1905 j. arestita de la rusa registaro kaj ekzilita Siberion. Forkurinte de tie en 1907 j., li laboradis ĝis 1912 j. en diversaj urboj de Francio kaj Germanio. El tiuj tempoj devenas liaj tre interesaj rememoroj.

En nova liberiginta Polio R. estas unu el la plej amataj ĉefoj de pola laboristaro. En sia hejmurbo Lodz li estas elektita je urbestro. Estante mem Esperantisto, li varme subtenas nian movadon kaj estas elektita kiel honora komitatano de la I-a Tuipola Esp. Kongreso.

Prezo de la 58-paĝa libreto afranke 0.50 svls. fk. aŭ egalvaloro. Por malbonvalutaj landoj 25% rabato.

Nederlanda Esperanta Komerc-Oficejo

(Nederlandsch Esperanto - Handelsbureau) Diergaardelaan 64, Rotterdam (Hollando)

Tradukas cirkulerojn, komercajn lerojn ktp. el Esperanto en nederlandan lingvon, kaj sin ŝarĝas per la dissendo de cirkuleroj.
 Prokuras komercajn adresojn.
 Prizorgas la anoncedon en Nederlando.
 Intertrilatis kun nederlandaj komercistoj kaj industriistoj.
 Sciigas la kurzojn de valutoj kaj valorpapiroj.

BES'a ADRESARO. Prezo 1.50 svls. fk., germanoj 88 mk. Krome sendkostoj. Havelia ĉe Esp. Eldonejo Butin & Jung, Godesberg, Germ.

UKRAINOJ ATENTU! Kiu scias, kie troviĝas nun Danil kaj Alie Taibulkin? Antaŭmilita adreso: Alie Taibulkin, gorod Kolonie Dobre, Stanzj Jafkino, Poĉtovaja odienja, Hersonski gub. — Skribu al s-o Maks Klepatsch-Tsibulkin, 9, rue des Sources, Genève, Svislando.

KOMERCAJN INTERILATOJN, eventuale reprezentadon de germanaj (sakaŝ) fabrikoj de tolajo, ŝtrumpetoj kaj laŭmoda komerco por sinjoroj serĉas solida importa firmo en Argentino. — Skribu al s-o A. Bartoš, Praha-Nusle 170-62, Ĉeĥoslovakio.

GASTIGO DUM LIBERTEMPO. Kiuj gesamideanoj (Danujo aŭ Hollando) gastigus dum kelka semajno kelkajn malriĉajn geknabojn senkoske, eble portus vojaĝkostojn? Sciĝojn petas rekte al s-o Inruisto Alfred Grube, Harburg (Elbe), Germ., Kreuzstr. 1.

Korespondo kaj Interŝanĝo.

S-o Murakami, Jurnalist, Redaktejo de Kyushu-Nippo, Fukuoka, Japanujo, deziras korespondadi kun alilandanoj nur per poŝtkartoj ilustritaj.

Fraŭlo L. Bonzon, Grand' Rue 20, Montreux, Svls., deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtkartojn kun ekster-eŭropanoj, balkanaj kaj baltaj ŝtatoj.

Du mezlernejaj amikoj volas korespondi kun ĉiulandaj gesamideanoj. — Iozefo Krausz, skolto, Pécs, F. Malom u. 18. — Banjuso Gujman, Pécs, Majlath tér 8, Hungario.

Junulo, 18-jara gimnaziano, deziras korespondi kun geluuloj el la tuta mondo per leroj. Adreso: Todor K. Popov, Peiric, Bulgario.

Erich Kleppisch, helpanto en Esp. eldonejo, Dresden A. 24, Schnorrstr. 27, Saksujo, deziras korespondi kun samideanoj ĉiulandaj por ilustr. poŝtkartoj (bfl.), leroj, kolektas poŝtkartojn kaj papieronojn eksterlandajn, interŝanĝas fotografojn.

Rudolf Preuss, juna poŝt-oficisto, Dresden, Böhmsche Str. 21, Germanujo, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj aŭ leroj kun la tuta mondo.

19-jarulo deziras korespondi kun la tuta mondo. — Hans Weigl, Hasendorf 30, poŝto Köllach, Sifrio, Aŭstrujo.

S-o Adolfo van Wesemael, studento, Heernislaan 27, Gent, Belgujo, volas korespondi per leroj, poŝtkartoj ilustr. (bfl.), prefere kun ĉeĥoslovakaj kaj balkananoj.

Lübeck. — Schifferhaus (Domo de la ŝipista societo).

Kiu ne povas viziti la XIV-an en Helsinki, vizitu almenaŭ la Antaŭ-kongreson en Lübeck, kie li trovos gesamideanojn ĉiulandajn!

Petu Aliĝilon de la Kongresa Komitato Lübeck, Falkenstrato 12.

Tipografistoj en la tuta mondo atentu!

La centra komitato de la svisa societo de maŝinkompostistoj deziras havi kunlaborantojn prifakajn el la tuta mondo kaj de ĉiuj maŝinsistemoj por sia oficiala organo „Der Maschinensetzer — Compositeur à la machine“ (La maŝinkompostisto). Precipe oni deziras informojn pri labor-kaj salajrkondiĉoj. Artikoloj estas akceptataj en germana, franca kaj Esperanta lingvoj kaj ili estas pagataj laŭpove.

Manuskriptojn oni sendu al: Karl Jost, monotipisto, Cullmannstrasse n-o 57, Zürich, Svislando.

Itala Vino

Unuakvalitajn vinojn de la Piedmonto kaj Toskanio eksportas al ĉiuj landoj

La Fermo **GIOVARA** Fedele Via Ciamarella 5, Torino (Italio).

Plej granda seriozece.
 Oni korespondas prefere Esperante.

Grava verko, kiun devas posedi ĉiu samideano:

Dr. Möbusz, Dokumentoj de Esperanto

Prezo 55 gmk., por mezbonvalutuloj 56 gmk., por bonvalutuloj 70 gmk. — Por pakado kaj sendkostoj aldonu 7 gmk., negermanoj 12 gmk.

Esperanto-eldonejo
Butin & Jung, Godesberg, Germ.

Nederlanda Anonima Societo

Luksa-pano Fabrikoj antaŭe Henri J. Carels.

50 Butikoj:
 Den Haag, Haarlem, Amsterdam.

Lunĉejo Carels
 (ĉefo: H.A. Scherwächter)
 63 Weimarstraat, Den Haag.
 Oni parolas Esperanton.

S-o Albin Korn, Ruslando, Petrograd, Fontanka 17, deziras korespondi kun ĉiuj landoj per leroj. — Kiu abonos por mi „Esp. Finn.“, „Nov. Eŭrop.“ k. a., al tiu mi sendos rusajn poŝtkartojn (ĉaraj, sovjetaj, uzitaj kaj neuzitaj), Esp. presajojn, naĉlingvajn gazetojn kaj revuojn ktp. — Gesamideanoj! neniam demandu pri mia konsento por korespondado aŭ interŝanĝado, sed komencu aferon tuj!

Esperantistino Apollonia Pileva, Ruslando, Petrograd, Fontanka 17, deziras interŝanĝi Esp. gazetojn kaj librojn. Por sovjetaj poŝtkartoj mi deziras ricevi Parizan, Londonan aŭ Berlinan ĵurnalon de modaj kostumoj.

Angelo Segarra, str. Cisterna 20, Tarrasa, Hisp., juna instruisto, deziras korespondi kun gesamideanoj ĉiulandaj pri seriozaj temoj per ilustr. poŝtkartoj kaj leroj; ankaŭ interŝanĝas poŝtkartojn.

F-ino Mevo Marurbo, Tallinn, poŝtkast 6, Estonio, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kaj leroj nur kun maristoj de la tuta mondo.

Hugo Lederer, Lazné Bělohrad, Bohemlando, deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustritajn, lerojn kaj poŝtkartojn kun ĉiulandaj samideanoj. Preferas fraŭlinojn.

Junaj geedzoj, kiuj laboris en Esperanta Biblioteko de G. Davidov en Saratov, petas bezonatajn Esperantafojn, korespondadojn kaj manĝaĵon rekompence je sincera kordanko kaj ĉio interesanta Eksterusovojn (poŝtm., poŝtk. il. kc.). Adreso: Serpuĉov, Moskovskaj gub., Moskovskaja ulica 79/187, M. Hruł, G. Stremel, Ruslando.

S-o Paul Söderström, Box 50, Norrahammar, Svedujo, deziras korespondi kun ĉiulandanoj.

S-o Einar Karlsson, Rommedalen, P. I. 61, Norrahammar, Svedujo, deziras korespondi.

S-o Volmar Lindman, p. I. 5, Norrahammar, Svedujo, deziras korespondi.

S-o Viktor Tell, Tällberg, Svedujo, deziras korespondi.

Rusujo, Tambov, Kronstadt'skaja 35, N. Medousov, deziras interŝanĝi Esperantafojn.

Tutmondaj policistoj korespondemaj pri policaj temoj aŭ interŝanĝemaj Esperantafojn, skribu al Dr. V. Toth, polic-konceptisto, Budapest, 6. ker. kapitanysag, Hungario.

Stefano Nyiry, polic-oficisto, Budapest, 6. ker. kapitanysag, Hungario, deziras korespondi pri polico, pri ĝia Esperanta movado kaj interŝanĝi poŝtkartojn ilustritajn.

Kiu sendos 200 nedifektajn poŝtkartojn el sia lando ricevos samvaloran kvanton da ĉeĥoslovakaj poŝtkartoj kaj belegan panoraman karton de mia urbo. — Antonín Uher, Praha, II, Jindřišska ul. 51.

Mi deziras korespondi kun gesamideanoj per poŝtkartoj ilustr. (Esp. mk., poŝtmk. bildfl.). — Adreso: Nešo D. Izkozov, s. Krušovice, Plevensko, Bulgario.

S-o Anders Orankvist, Box 166, Koranäs, Sved., deziras korespondi kun samideanoj el ĉiuj landoj, sed precipe kun bontemplanoj en Ameriko, Islando kaj Finnlando.

Josef Eder salutis siajn gekorespondantojn kaj sciigas al ili la ŝanĝon de sia loĝejo. La nova adreso estas: Graz, Lastenstr. 6, dua etaĝo.

F-lo Josefo Comas, strato Judios 6-1, Manresa (Barcelona), Hispanujo, deziras korespondi per poŝtkartoj, precipe kun meblistoj en la tuta mondo.

30-jara anglo deziras korespondi kun geksterlandanoj pri liberpenso kaj similaj temoj. Ne interŝanĝas poŝtkartojn! S-o S. J. Smith, 45 High St., Sydenham, London S. E. 26

Mi interŝanĝas poŝtkartojn kaj papieronojn, ankaŭ sendas poŝtkartojn kontraŭ papieronoj de ĉiuj landoj: Lichtenŝtejn, Bialystok, Sobieska 1, Polujo.

Rusujo, Astrachan, Armjanskij most 111, G. Artemjev, deziras korespondi kun gesamideanoj ĉiulandaj, interŝanĝi poŝtkartojn, poŝtkartojn ilustr., Esp. gazetojn, fotojn kaj papieronojn aperintan dum la milito.

Filatelistoj, kiuj sendos al mi 50 aŭ 100 poŝtkartojn de sia lando, ricevos la saman kvanton de mia lando kaj aliajn de Suda Ameriko. — Eŭropo, Azio dum la milito. — F. R. Varela, San Francisco 824, Buenos Aires, Argentina Respubliko.

Max Hubl, Salzburg, Aŭstrio, Auerspergstrasse 54, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kun ĉiuj landoj, precipe ekster-eŭropaj. Ankaŭ interŝanĝas poŝtkartojn.

Mi deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustritajn kun samideanoj el ĉiuj landoj.
 Henning Halldor, Helsingegatan 9, Stockholm V-a, Svedujo.